# BULGARA ESPERANTISTO

4 • 1981

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





La XII kongreso de BKP kunsidas

## LA POPOLA KULTURPALACO «SOFIO» — ALLOGA KULTUR-KONGRESA CENTRO

La Popola Kulturpalaco „Sofio" jam estas realaĵo, preta por kontentigi la kreskintajn eksterordinare nuntempajn bezonojn de la kultura kaj socia vivo de nia ĉefurbo kaj lando. En ĝi okazis la XII kongreso de BKP.

La palaco estas precipe kultura centro kun funkciaj eblecoj kaj teknikaj ekipaĵoj por realigo (aparte kaj komplekse) de ĉiuj kulturaj kaj artaj okazaĵoj. Ĝi estas ankaŭ kongresa centro por organizado de diversaj sociaj, politikaj, sciencaj, teknikaj k.a. kongresoj, konferencoj, konsiliĝoj, simpozioj, seminarioj, solenaĵoj.

La unika kulturpalaca komplekso konsistas el 12 haloj (kun entute 10 750 sidlokoj) en kombino kun antaŭsalonoj kaj zonoj por ripozo kaj kontaktado, diversspecaj manĝejoj, junulara klubo, disko-baro, magazenoj. En la enirejoj troviĝas poŝtoficejo, informservo, biletgiĉetoj k.a. Ĉion ĉi oni realigis originale, bele kaj komforte sur konstruita areo de 17 000 m².

La signifo kaj la rolo de la kulturpalaco ĉiam pli kreskos en interna ia skalo. En ĝi okazos internaciaj aranĝoj, kongresoj kaj konferencoj. La Popola Kulturpalaco „Sofio" viciĝas inter la internaciajn kultur-kongresajn centrojn kaj jam membras en la Asocio de Internaciaj Kongresoj kaj Konferencoj.

---

### ENHAVO


* * * Aprilo, kiam ĝardenoj ekfloris . . . . . . 1
Georgi Dikovski. Mi gloras! . . . . . . . . . 2
Donĉo Ĥitrov. Jaro 20a de la kosma erao . . . 3
Coĉo Kolarov. BEA — seminario por aktivuloj . 5
Daniela Deĉeva. Forpasis eminenta sciencisto-esperantisto . . . . . . . . . . . . . . . . . 8
Evgeni Georgiev. Perspektiva agadformo . . . . 9,10
Ĥ. M. G. La ruĝa trumpetisto . . . . . . . . 11
Hristo Stojnov. Pliska kaj Preslav . . . . . . . 12
* * * Literaturo, arto, kulturo . . . . . . . . 15
* * * Premio „H. K. Andersen" al Vesa Paspaleeva III
* * * Distra paĝo . . . . . . . . . . . . . IV


Sur la kovrilpaĝo: Popola Kulturpalaco „Sofio".


**Redakta komitato:**

Donĉo ĤITROV (ĉefredaktoro), Marin BAĈEV, Vasil BOROVANSKI, Dimitâr DENĈEV, Evgeni GEORGIEV (sekretario), Dimitâr ĤAĜIEV, Krâstju KARUCIN Ĥaim LEVI (vicĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi GAREV

Korektis: Evgeni GEORGIEV

Revuo „Bulgara Esperantisto" — fondita en 1919 j. Eldonkvanto 6 100.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO"
Bul. Ĥristo Botev 97, P. K. 66
1303 Sofio, Bulgario 1000 Sofio
tel. 32-40-68, 31-00-29

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

APRILO
1981
4
JARO 50

# APRILO KIAM ĜARDENOJ EKFLORIS . . .




Tio okazis ĝuste antaŭ 25 jaroj. En la lando ekfloris la ĝardenoj, kaj en la vicoj de BKP ekfloris novaj ideoj. Ili ekfloris en la kadroj de la Aprila Plenkunsido de CK, kiam la ĵus okazinta XX kongreso de KPSU fariĝis instrua leciono por la bulgaraj komunistoj. Oni severe kritikis la kulton al la personeco en la vicoj de BKP, kiu havas nenion komunan kun la marksisma-leninisma instruo. La plenkunsido restarigis la leninajn principojn de partia kaj ŝtata gvidado, kreis kondiĉojn por entreprenoj kaj iniciatoj en ĉiuj sferoj de la socia vivo.

La Aprila Plenkunsido konfidis la gvidadon de la partio al k-do Todor Ĵivkov. Per tio komenciĝis la nova etapo en la evoluo de BKP kaj la popolo.

Pasis 25 jaroj depost tiu historia plenkunsido. Dum tiuj jaroj nia lando daŭrigis sian marŝon al socialismo. Plenrajte oni povas aserti, ke tiu ĉi dudekkvinjara periodo estas plej enhavoriĉa kaj plej bonrezulta. Dum ĝi plene disfloris la socialisma demokratio. La plej vastaj popolamasoj partoprenis la diskutadon de gravaj dokumentoj de la partio: la programo, la kongresaj dokumentoj k.a. Tutpopole diskutita estis ankaŭ la nova konstitucio de PR Bulgario.

„Tutpartia, tutpopola diskutado pri la stato kaj evoluo de la lando survoje al socialisma sociordo povas permesi al si nur partio, kiu sentas sin forta, matura, kontaktanta la popolon kaj certa pri si mem" — diris tiutempe k-do Ĵivkov.

En aprilo, kiam la ĝardenoj ekfloris, refreŝiga spiro karesis ankaŭ la nialandan E-movadon. Dum la somero de la sama jaro en Sofio okazis la 32a kongreso de BEA. Ĝi akceptis novan statuton, ellaboris programon por restarigo de la lokaj E-societoj. Post kelkjara stagnado denove ekpulsis la koro de la Movado — la Centra Estraro. Sekvis kongresoj en Varna, Veliko Târnovo, Burgas, Pleven, Varna, Smoljan, Ruse, Plovdiv — entute naŭ kongresoj dum tiu periodo. En tiuj kongresoj nia kolektiva penso ellaboris la taktikon kaj la planojn por organiza kaj propaganda laboro. Dank' al tio BEA fariĝis unu el la plej bone organizitaj E-asocioj en la mondo. Ĝia aŭtoritato kreskis kiel internaciskale, tiel ankaŭ en nia lando. Ĉe ni BEA ĝuas rekonon kaj kunlaboron kun plej amasaj tutpopolaj organizoj — Patrolanda Fronto, Komsomolo, Sindikatoj, packomitatoj k.a.

Senbrue, diligente la bulgaraj e-istoj metas sian brikon en la imponan konstruaĵon de la matura socialismo.

Kiel ĝis nun ankaŭ estonte BEA daŭrigos kun pli dranda energio sian laboron por la politika kaj ekonomia impeto de nia lando.

Nian patrujon — Popolan Respublikon Bulgarion — ni arde amas kaj por ĝia ĉiuflanka florado kaj progreso ni tutforte laboras.

OKAZE DE LA XII KONGRESO
DE BULGARA
KOMUNISTA PARTIO

# MI GLORAS

I

Ekflirtu, sangruĝa standardo,
kaj tondru vi, voĉo partia!
Ni, bravaj, kaj venkaj kaj ardaj
disportos la veron al ĉie. . .

Anoncu, vi tero, la feston —
dektrian jarcenton popolan,
dum kiu ni kosme elkreskis,
dum kiu en sturmo malmola

laŭ vojo de Lenin konstruas
ni fratan revatan socion.
Konduku, standardo, nin pluen
tra baroj, tra fikalumnioj!

Kaj ni en la lasta batalo,
brakinte ideojn senmortajn,
grandpaŝe al celo, ne falos —
estiĝos pli viglaj, pli fortaj.

II

Printemp' eterna
de l'viv' surtera,
partio mia,
vi ĉion scias:

plantas progreson,
estinton pesas,
estonton montras —
mirsunajn fontojn.

Vi — sama vero,
neas ĥimerojn,
neas la bruon,
miskapojn skuas!

Kun amo varma,
vi, vere ĉarma,
lumigas ĉion
per vivradioj!

III

Amforto mira —
partio mia,
vi, glav' kaj liro,
magnet' altira.

Ĉe la malbono —
milde malmola,
ĉe la bezono —
patrin' konsola.

Kaj hor' minaca,
kiam aperas,
vi tuj aŭdacas —
tondras severe.

Panje fervora,
ĉiam malcede
gvidu nin kore
laŭ novaj padoj!

Faroj grandegaj —
jen via riĉo.
Kantojn plej belajn —
al vi dediĉe!

Panjo plenvola
panjo popola,
gloron por ĉiam
al vi partio!

Georgi DIKOVSKI

---

## NOVA INICIATO DE LA REDAKCIO

Por respondi al la interesoj kaj la deziroj de la legantoj de „BE" la redakcio decidis eldoni fine de la jaro specialan „numeron de la leganto".

Ni petas ĉiujn legantojn sendi siajn proponojn kaj sugestojn pri materialoj, kiujn ili dezirus legi sur la paĝoj de nia revuo.

Lasta limdato — la 1a de julio. Viaj verkoj estos bonvenaj.

---

# JARO 20a DE LA KOSMA ERAO

## STELAJ ŜTUPOJ

*Por ĉiam en ĉiujn analojn de la historio eniris la tago 12a de aprilo 1961. La legenda starto de Jurij Gagrin sciigis la planedon pri la naskiĝo de nova erao — la kosma. Ne estas hazarda la fakto, ke kune kun la soveta popolo la tuta progresema homaro festas la 12an de aprilo kiel Tagon de la Kosmonaŭtiko.*

*Mirindaj ŝanĝoj okazis ekde tiu tempo en la esploroj por ekposedo de malproksimaj mondoj. Sur la vojon trairitan de Gagarin eliris en orbiton aliaj herooj — senlacaj esploristoj de la kosma spaco. De la 108-minuta flugo de la unua Kolumbo de l'universo ĝis la 185-tagnokta flugo en orbito de Leonid Popov kaj Valerij Rjumin kaj al senĉese agantaj sciencaj kompleksoj — tiaj estas la ĉefaj direktoj de la stela printempo de la homaro, de ĝia neokazinta ĝis nun florado.*

*Jam anoj de ok frataj socialismaj landoj estis en la kosmo. En la venontaj jaroj estas planitaj novaj startoj en la kosman spacon, kiujn partoprenos kosmonaŭtoj el Rumanio, Francio, Hindio . . . La pordoj de „Interkosmos" estas malfermitaj por ĉiuj pacamaj popoloj.*

*La esploroj de la terglobo, faritaj el la kosmo pere de novaj aparataroj, projektitaj kaj produktitaj en diversaj socialismaj landoj, jam donis la unuajn ekonomiajn kaj sciencajn rerezultojn en malkovro de petrol- kaj gaskuŝejoj kaj de aliaj naturaj minvejnoj. Nur tiujn akirajojn oni kalkulas je miliardoj da enspezitaj financrimedoj. Nur tio jam pruvas la grandegan rolon de la kosmonaŭtiko por la solvo de gravaj por la homaro taskoj — precipe en la sfero de la nacia ekonomio.*


*La kosmo servas al la bono de la tuta homaro, al la afero de la monda paco kaj al la progreso. La homoj atendas kun profunda fido kaj espero la novajn atingojn de la kosmaj esploroj, pluajn stelajn ŝtupojn en la ekposedo de l'universo.*

D. ĤITROV

## KOMENCE ESTIS IDEO KAJ LA IDEO ESTIS SCIENCO

### (DENOVE PRI LA SCIENCO, TEKNIKO KAJ ESPERANTO)

Ni admiris la epokfarajn flugojn de sovetaj kaj usonaj kosmonaŭtoj ĉirkaŭ la Tero; ni miris pri la unuaj sovetaj aŭtomataj kosmostacioj kaj pilotataj usonaj kosmoŝipoj, surflugintaj la Lunon; nin ĉiam surprizas la sukcesoj de la direktataj al diversaj planedoj sovetaj kaj usonaj kosmaj aparatoj. Sed eble malofte ni konjektas, ke ĉio ĉi iam estis nur scienca penso de Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij kaj de liaj disĉiploj. Tio montras, ke „la revulo el urbo Kaluga", kiel nomis lin liaj samtempuloj, ne estis „vana fantaziulo", sed granda sciencisto kaj inventisto.



K. E. Ciolkovskij

Jam en la fino de la pasinta jarcento K. E. Ciolkovskij argumentas sciencteknike la konstrukcion de direktebla metala balono, kiu apenaŭ en nia tempo estis realigita kaj uzata en USSR por transportado de pezaj ŝarĝoj al netrapaseblaj regionoj. Li ankaŭ prilaboras la teorion pri la moviĝo de la reakciaj aparatoj kaj faras skemojn de raketoj por interplanedaj vojaĝoj.

Post la Granda Oktobra Socialisma Revolucio li kreas la teorion pri la flugo de jetoj kaj proponas skemojn de aviadiloj kun supersona rapideco. En la mezo de la 30-aj jaroj de nia jarcento li publikigis la teorion kaj skemon de trajno sur aerkuseno.

Prilaborinte la teorion pri la raketoj kaj iliaj moviloj (aparte la teorion pri la plurgradaj raketoj), Ciolkovskij unuafoje solvis la taskon pri la moviĝo de la raketoj en hete-

rogena kampo de gravito kaj pri surflugo de kosmaj raketaparatoj sur planedojn, ne posedantajn atmosferon. Liaj esploroj unuafoje pruvas la eblecon atingi kosmajn rapidecojn por efektivigo de senfinaj flugoj en la universo, uzante anticipe faritajn internajn bazojn por interplanedaj komunikoj. Li estis la unua, kiu studis la problemojn de la sputnikoj de la Tero kaj de ties uzo por bezonoj de la popola ekonomio. Li ankaŭ traktis la medicin-biologiajn demandojn, aperantajn ĉe longdaŭraj kosmonaŭtikaj flugoj ktp.

Krome K. E. Ciolkovskij okupiĝadis pri biologio, lingvistiko k.a. Li skribis broŝureton „Ĉiuhomaj alfabeto, ortografio kaj lingvo". En ĝi li proponis kosman planlingvon „AO", kiu havu la rolon de komuna lingvo en tiu ĉi parto de la universo, kien penetrus la raketŝipoj de teranoj.

Poste Ciolkovskij komprenis, ke Esperanto estas „la plej bona el ĉiuj planlingvoj", kiel li mem notas en sia letero kaj fariĝas ĝia arda adepto. Sur sia broŝuro, kiun li donacis al M. I. Popov, unu el liaj biografoj, konservinta lian esperantistan membrokarton kaj dokumentojn pri lia E-agado, li skribis: „Esperanto estas la plej bona, „AO" estas stultaĵo".

Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij venas al Esperanto tute nature, ĉar tiu ĉi lingvo estas scienca produktaĵo, destinita por la scienco kaj tekniko, kaj ne nur por verkado de belartaĵoj. Ĝi estas serioza afero, ĉar originas de la scienco.


**Vasil BOROVANSKI**

# BULGARA KOSMA KONTRIBUO

La kunlaborado por esploroj kaj uzo de la kosma spaco jam allogis multajn landojn. Tio estas motivata unuflanke pro la neceso solvi la gravajn sciencajn kaj aplikajn problemojn, ligitajn kun la ekposedo de la kosmo.

En aprilo 1967 estis akceptita kompleksa programo „Interkosmos" pri kunaj kosmaj esploroj, kiu prezentas tute novan etapon en la sciencteknika kunlaborado de socialismaj landoj en la kosmoesplorado. En ĝi partoprenas Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Kubo, Mongolio, Pollando, Rumanio, Sovetunio.

Kiamaniere Bulgario kontribuas al la programo „Interkosmos"? Ĝi aktive kunlaboras en la grupoj por esploroj de la alta atmosfero kaj jonosfero, por fizikaj procedoj en la interplaneda plasmo kaj ties influoj al la magnetosfero de la Tero; problemoj de la suna aktiveco; por solvo de geodeziaj kaj geofizikaj taskoj.



En 1981 estos lanĉitaj de soveta kosmodromo du sputnikoj, kies tuta ekipaĵo estos bulgara. La scienca programo, realigota pere de ili, estas nomita „Bulgario 1300" omaĝe al la 13-jarcenta jubileo de la bulgara ŝtato. Ĝi ampleksas kvar ĝeneralajn grupojn da esploroj por praktikaj celoj: esploroj de plasmaj kampoj, esploroj de optikaj fenomenoj, esploroj en la sfero de la kosma geodezio.

La ĉefa tasko de la unua sputniko „Bulgario 1300 — I", kiu restos en orbito dum kelkaj jarcentoj, estas la esplorado de reciprokaj influoj de la jonosfero al la magnetosfero.

La sputniko „Bulgario 1300 — II" estos ekipita per aparataro, kiu registros la reflektitan sunan radiadon kaj partojn de la spektro en sia videbla kaj infraruĝa diapazono. Tiuj tiel nomitaj „distanc-metodoj" por esploro de la Tero el la kosmo ebligas kolektadon de informoj, kiuj havos aplikon en la geologio, geomorfologio, agrikulturo kaj forstokulturo, seismotektoniko, oceanografio ktp. La bulgaraj sciencistoj havas gravan kontribuon al tiaj esploroj pere de la aparato „Spektro — 15", kiun ili pretigis por la flugo de la unua bulgara kosmonaŭto Georgi Ivanov.

La programo „Bulgario 1300 — II" estos plenumita samtempe pere de artefarita tersatelito, speciala aviadilo — laboratorio, sur kies bordo estos la sistemo „Spektro — 15 M. C.", perfektigita aviadila varianto de la kosma aparato „Spektro-15", kaj centro por terobservado.

En la kompleta programo „Bulgario 1300" partoprenos 12 originalaj bulgaraj aparatoj. La mekanismo, kiu direktas la laboron de la tuta sistemo, ankaŭ estis produktita en nia lando. La ricevado kaj la prilaboro de la rezultoj estos efektivigataj en Bulgario.

„La projekto „Bulgario 1300" estas la plej granda scienca programo, kiu aparta socialisma lando realigos pere de programo „Interkosmos" — deklaris la gvidanto de la Instituto de Kosmaj Esploroj ĉe la soveta Akademio de Sciencoj akad. Roald Sagdeev.

**D. D.**

# BEA — SEMINARIO POR AKTIVULOJ

Estas notinde, ke lastatempe BEA iniciatis utilajn kaj fruktodonajn aranĝojn. Unu el ili estis la seminario por aktivuloj de la Distriktaj Estraroj, okazinta je la 28-a de februaro kaj la 1-a de marto k.j. en urbo Loveĉ. Partoprenis 67 aktivaj gee-istoj el la tuta lando.

La urbo de la siringoj gastame akceptis la partoprenantojn. La Distrikta Junulara Domo disponigis bonegajn kondiĉojn por aktiva laboro. Sabate posttagmeze la sekretario de BEA Dimitâr Papazov malfermis la seminarion. Sekvis prelego de la ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Vâlev je temo: „Laboro por E-o laŭ la nuntempaj postuloj". Okazis vigla diskutado. Oni esprimis sian kontenton pro la majstre farita prelego, ĉiuflanke traktanta la propagandajn problemojn de E-o, kaj emfazis, ke tiu agado postulas aktualajn kaj efikajn rimedojn kaj formojn. Estis faritaj multe da konkretaj kaj utilaj proponoj — precipe utiligi la amaskomunikilojn por E-varbado kaj informado.

Dimitâr Papazov prelegis detale pri la nuntempa kunlaboro de BEA kun la amasaj organizaĵoj, movadoj kaj ŝtataj organoj. Li resumis la ĝisnunajn spertojn kaj proponis iniciatojn kaj rimedojn por kunlaboro kun la Komsomolo, kun la Patrolanda Fronto kaj la Sindikatoj. Je la nomo de la gastigantoj Coĉo Kolarov, vicprezidanto de DE de BEA, rakontis pri la kunagado inter la Klubo de E-istoj kaj la Sindikata Kulturdomo en Loveĉ.

La parolon prenis ankaŭ la nova ĉefredaktoro de „BE" Donĉo Ĥitrov, kiu skizis la ĉefajn direktojn en la plua redaktado de la revuo kaj alvokis la aktivulojn al regula kunlaboro.

La sekvan tagon antaŭtagmeze la vicprezidanto de BEA Petâr Todorov parolis pri la loko kaj la rolo de BEA en la internacia E-movado. Per multaj ekzemploj li bildece prezentis la nunan situacion.

Dimitâr Ĥaĝiev, prezidanto de la bulgara MEM-sekcio, proponis tekston de telegramo al la Monda Packonsilio, kiun la ĉeestantoj aprobis.

La seminarianoj festis la alvenon de frua printempo en agrabla amika etoso. Post la finiĝo de la seminario la gastoj trarigardis la vidindaĵojn de Loveĉ.

**Coĉo KOLAROV**

**LOVEĈ**

— Kontentiga unujara agado;
— kunlaboro kun la E-klubo ĉe la Sindikata Kulturdomo en la urbo kaj kuna organizado de E-aranĝoj de distrikta, landa kaj internacia karaktero;
— varia vespero en decembro omaĝe al la patrono de la societo „D-ro L. L. Zamenhof";
— pri multe da membroj. . .

Jen kelkaj pli gravaj eroj raportitaj en la jarkunveno de la medicina E-societo „D-ro L. L. Zamenhof". Por la kuranta jaro oni planis okazigon — kune kun la aliaj urbaj E-societoj — de vespero dediĉe al la internacia korespondado, partoprenon en landa medicinista E-renkontiĝo, en la III Internacia Medicina E-Konferenco en Ruse k.a.

**Peĉo Vlaĥov**



Parolas la vicprezidanto de BEA Petâr Todorov



Partoprenintoj en la seminario

## SVIEKO '81

La Supera Ekonomia Instituto „D. A. Cenov" en Sviŝtov estas la ĉefa organizanto de II Nacia Konferenco pri Ekologiigo de la Socia Produktado (SVIEKO '81), okazonta inter la 15a kaj 20a de junio en urbo Sviŝtov (Norda Bulgario).

La celoj de la konferenco estas pritaksi la akiritajn ĝis nun spertojn kaj pridiskuti teoriajn kaj praktikajn problemojn de la ekologiigo de la socia produktado. Partoprenos ankaŭ sciencistoj el USSR, Hungario, Ĉeĥoslovakio k.a. La programo antaŭvidas kvar laborgrupojn kun gvidantoj prof. Ĥristo Marinov, M. Meĥanĝiev, G. Golov kaj G. Belaĉev. Por la partoprenantoj estos senpagaj ekskursoj al modele ekologie aranĝitaj entreprenoj. Dum SVIEKO '81 estos organizita internacia ekologia libroekspozicio.

Oficialaj laborlingvoj estas bulgara, rusa kaj Esperanto.

Esperantistoj-sciencistoj el Hungario, Nederlando, Bulgario k.a. partoprenos kun referaĵoj en la E-sekcio de la konferenco.

Estas invitataj ĉiuj esperantistoj-ekologoj partopreni en tiu faka aranĝo kaj pruvi la *taŭgecon de E-o.*

Por informoj kaj pliaj detaloj pri SVIEKO'81 skribu al prof. Ĥristo Marinov, Supera Ekonomia Instituto „D. A. Cenov", 5250 Sviŝtov, Bulgario.

**ORJAĤOVO.** Antaŭ kvin jaroj estis fondita la nova E-societo „Georgi Stanev" en u. Orjaĥovo. Ni ne traktos la kaŭzojn de tiu evento, ĉar estas iom stranga tiu „malfruiĝo", sed ni devas substreki la fakton, ke ni ankaŭ festis la 60-jaran E-agadon en nia urbo, kiu havas malnovajn tradiciojn en la disvastigo de la Internacia Lingvo samkiel en la batalo por nova sociordo.

La membraro de la societo partoprenis emociigan festadon de tiuj datrevenoj, samkiel esprimis sian profundan estimon al la memoro de d-ro Zamenhof.

Post la interesa parolado de la sekretariino de la societo Venka Petrova kaj de St. Pavunĉev, pri la unuaj paŝoj de E-o en Orjaĥovo (de 1910) rakontis Nadja Bosaŝka.

Estis disdonitaj modestaj donacoj: al la plej malnova e-istino Vesa Ilieva, al Evgenia Cekova, kiu estas kudrinta kaj brodinta la novan standardon de la societo, ankaŭ al la gastoj.

Belartan programon prezentis membroj de la E-societo. Kreiĝis vere intima kaj festa etoso.

**N. B.**

**ASENOVGRAD.** La 20an de februaro okazis la jarkunveno de E-societo „David Sasonov". La klubejo estis plenplena. Ĉeestis 60 e-istoj.

La kunveno estis malfermita per belarta programo de E-grupo „Verda Stelo". Pri sukcesa agado dum la pasinta periodo raportis la prezidanto Emil Ĉirpanski. Jen la atingitaj rezultoj: konsiderinda kresko de la societa membronombro, vigla kursa agado (sep kursoj) kaj bonega abonkampanjo por „BE" (124 abonoj kontraŭ 30 pasintjare).

Oni fondis lernantan E-grupon ĉe la societo.

Emil Ĉirpanski estis reelektita prezidanto de E-societo „David Sasonov".

**ŜUMEN.** Fine de februaro oni okazigis vesperon dediĉe al sovetaj amikoj. La amkeco komenciĝis en la tridekaj jaroj, kiam la progresemaj e-istoj Ljuben Kaŝĉiev, Atanas Bojaĝiev, Canko Karaspasov k.a. komencis korespondi kun sovetaj e-istoj kaj ricevi la revuojn „Ogonjok" (Fajreto) kaj „USSR" na Strojke" (USSR en konstruado). El ili oni eksciis la veron pri Sovetunio — la unua socialisma lando en la mondo.

Raporton pri la amikaj ligoj faris Canko Murgin, instruanto en la Supera Pedagogia Instituto en Ŝumen. Apartaj gekamaradoj voĉlegis leterojn de siaj korespondamikoj kaj rakontis pri renkontiĝoj en Bulgario kaj Sovetunio.

**Cvjatko Todorov**

**PAZARĜIK** Sub la devizo „Per Esperanto — por paco kaj amikeco" trapasis la jarkunveno de E-societo „Radio". Raporton pri la agado faris ties prezidanto Pejo Peev.

Nun la societo havas 120 membrojn. Oni aktive korespondas kun e-istoj el diversaj landoj, diskonigante la sukcesojn de nia lando. Pasintjare la e-istoj de Pazarĝik solene celebris la 70-jariĝon de la fondiĝo de sia societo.

**Kostantin Genĉev**

**SVIŜTOV.** En bele ornamita klubejo de la Patrolanda Fronto okazis la jarkunveno de E-societo „Danuba Stelo". La tago de la jarkunveno — la 11a de februaro — koincidis kun grava datreveno por la urbo — 125 jaroj ekde la fondiĝo de la unua bulgara legorondo kaj legejo en urbo Sviŝtov.

La kunveno estis malfermita per interesa belarta programo — recitado kaj kantoj en E-o, plenumitaj de lernantina E-grupo. Raporton pri la diversflankaj aktivecoj dum la pasinta periodo faris la ĝisnuna prezidanto d-ro Blagovest Toŝev.

Estis elektita nova estraro, kiun eniris tri novaj esraranoj. Nova prezidanto estiĝis Pepa Ivanova — membro de CE de BEA kaj ĝisnuna vicprezidanto de la societo.

**Inĝ. Mitko Nenkov**

**ELĤOVO.** La partoprenantoj en la kurso por komencantoj okazigis kunvenon. Ĝi estis malfermita de la kursgvidanto Irina Nejĉeva, gimnazia instruistino.

Pri la rolo kaj signifo de la Internacia Lingvo kaj pri la fruktodona agado de la bulgaraj e-istoj enlande kaj eksterlande parolis Dimo Trudoljubov, prezidanto de la Distrikta-Urba Estraro de BEA en Jambol. Georgi Dimov, sekretario de la Komunuma Komitato de BKP, salutis la novajn e-istojn.

La kunveno decidis refondi la E-societon „Trakia Stelo" kaj elektis novan estraron. Prezidanto estiĝis Irina Nejĉeva.

**Marina Ivanova**



**Membroj de la refondita E-societo „Trakia Stelo"**

## JUBILEA SCIENCA KONFERENCO «BULGARIO—1300»

La Centra Estraro de BEA kaj la Distrikta Estraro en Šumen organizas la 29—31 de majo 1981 en Šumen kaj Preslav Jubilean Sciencan Konferencon „Bulgario — 1300“. Partoprenos eksterlandaj gastoj.

La programo antaŭvidas ok sciencajn prelegojn, ekskursojn al historiaj vidindaĵoj, teatran spektaklon.

Kondiĉo por partopreno — bona posedo de E-o.

Aliĝoj estos akceptataj ĝis la 1a de majo. La partoprenkotizo 24 lv. inkluzivas loĝadon, manĝadon, ekskursojn kaj viziton al dramprezentaĵo. La sumon transpagu al adreso: OR na BES, s/ka 185/6041, DSK Šumen. Por pliai informoj turnu vin al DE de BEA, p.k. 99, 9700 Šumen; tel. 6-30-17, Dimităr Minčev (post 18a horo).

## INTERNACIA ESPERANTISTA LABORBRIGADO ARKEOLOGIA

De la 12-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 1981 en vilaĝoj Dobrodan kaj Debnevo, distrikto de Loveč, situantaj ĉe la piedoj de Balkan-montaro, okazos Internacia Esperantista Labor-Brigado Arkeologia (IELBA), dediĉita al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. La brigadon partoprenos 120 junaj geesperantistoj de 18—30 jaraĝo el pli ol 10 landoj.

La ununura kondiĉo por partopreno en IELBA estas la sufiĉe bona rego de Esperanto, kio devas esti konfirmita de koncerna landa asocio aŭ loka E-grupo.

La laborkondiĉoj estas sufiĉe bonaj. La brigadanoj okupiĝos pri malpeza fizika laboro — arkeologiaj prifosoj. La tuta laborperiodo daŭros 22 labortagojn kaj la labortago — 7 horojn (6.30—13.30).

Korespondadreso: **ESPERANTISTA ARKEOLOGIA LABORBRIGADO, P. K. 20, 5500 LOVEČ — BULGARIO.**

# INTERESA FAKTO



La knaba gimnazio en urbo Dupnica (hodiaŭ Stanke Dimitrov) estas la unua en Bulgario, kiu jam en 1910 enkondukis fakultativan instruadon de la Internacia Lingvo E-o.

En 1909 oni fondis E-societon „Suno“ en Dupnica kaj elektis Aleksandăr Šakelatiev sekretation. Konsiderindan kontribuon por la altigo de la intereso pri E-o donis la horloĝisto Todor Miĵorov. La tiama direktoro de la knaba gimnazio St. Stojkov, e-isto, decidis enkonduki fakultativan instruadon de E-o en la gimnazion.

En korespondaĵo, publikigita en n-ro 10 (junio) 1910 en gazeto „Lumo“, tiutempe oficiala organo de la tiama Bulgara E-Ligo, oni legas: „Dupnica. La instruista konsilantaro de la gimnazio en Dupnica konforme al propono de s-ro St. Stojkov, elstara e-isto, unuanime akceptis enskribi en la novan instruprogramon la fakultativan instruadon de E-o po unu horo semajne.

La grupo dankas al s-ro Stojkov kaj al ĉiuj instruistoj por la bona homama ideo, per kiu ili donas imitindan ekzemplon al ĉiuj, laborantaj en la instruado.“ La E-asocio ankaŭ dankis per speciala letero por la iniciato.

**Stoil Kolarov**

El ĵ. „Dupniška komuna“, 14. 11. 1981

# FORPASIS EMINENTA SCIENCISTO-ESPERANTISTO



Granda perdo trafis la bulgaran kulturon. Forpasis la eminenta sciencisto, humanisto, sociaganto, aktiva pacbatalanto, dojeno de la bulgaraj fizikistoj, elstara esperantisto — akademiano Georgi Stefanov Naĝakov.

Li naskiĝis la 7an de januaro 1897 en urbo Dupnica (hodiaŭ Stanke Dimitrov). Fininte la fizik-matematikan fakultaton de la Sofia Universitato en 1920 li specialiĝis en Parizo (1925—1926).

Akad. Naĝakov dediĉis 60 jarojn de sia vivo al la fiziko en nia lando kiel esploristo, organizanto kaj pedagogo. Li estas aŭtoro de pli ol 100 sciencaj verkoj. Liaj originalaj esploroj en la fako de la solidaĵoj — elektraj kaj fotoelektraj fenomenoj en duonkonduktantoj kaj dielektrikoj, la elektrostatika elektrometrio, metalanalizoj — multe kontribuis al la fizikaj sciencoj. Lia ĉefa atingo — la eltrovo de la fotoelektreta stato de la substanco — estas registrita kiel invento n-ro 1 en PR Bulgario. Ĝi stariĝis la komencon de nova scienca fako, evoluanta sukcese en multaj landoj: Sovetunio, Usono, Japanio ktp. Lia scienca agado ricevis vastan internacian rekonon. Oni elektis lin membron de eksterlandaj sciencakademioj.

Edukito de la rimarkindaj fizikistoj kaj humanistoj Paul Langeven kaj Marie Curie, konvinkita, ke la scienco devas servi al la homprogreso, akad. Naĝakov aktive partoprenis la pacbatalon kiel prezidanto de la Nacia Pacdefenda Komitato, Monda Packonsilio (MPK) kaj unu el la fondintoj de la Pugwash-movado de la sciencistoj. Pro liaj meritoj oni elektis lin honoran prezidanton de MPK en 1979.

Jam lernanto Georgi Naĝakov ellernis la Internacian Lingvon. Multfoje li esprimis sian pozitivan rilaton al ĝi. En 1963 dum la III Ĝenerala Konferenco de MEM en Sofio je la nomo de la Nacia Pacdefenda Komitato li salutis en Esperanto la delegitojn. Kiel ĝia prezidanto akad. Naĝakov aranĝis la disponigon de subvencio por eldonado de la bulgaraj numeroj de gazeto „Paco". Estinte membro de la prezidantaro de la bulgara parlamento, li aktive subtenis la kampanjon por kolektado de subskriboj por honorigo de UEA per la Nobela Pacpremio.

Akad. Georgi Naĝakov estas Heroo de la Socialisma Laboro, Popola Aganto de la Scienco, laŭreato de Dimitrov-premio, portanto de multaj bulgaraj kaj eksterlandaj distingoj.

**Daniela DEĈEVA**

---

La 23an de marto k. j. subite forpasis
ATANAS DANĈEV ATANASOV (ADA)
(1892—1981)

La bulgaraj esperantistoj profunde funebras pri la perdo de la eminenta veterano de la tutmonda E-movado, multjara prezidanto de BEA kaj ĉefredaktoro de «Bulgara Esperantisto», aŭtoro de lernolibroj kaj prilingvaj verkoj.

ADA estas mondkonata esperantisto, eksa vicprezidanto de Akademio de Esperanto, eksa prezidanto de Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj, honora membro de BEA kaj UEA. Pro sia valora kaj popolutila kultur-kleriga agado li estis distingita per ordeno «Kiril kaj Metodi» — ora.

Atanas D. Atanasov restas por ĉiam en la memoro kaj la koroj de la bulgara kaj tutmonda esperantistaro.

**HILDA DRESEN NE PLU ESTAS EN NIAJ VICOJ**

En februaro ĉi-jare forpasis la elstara mondkonata poetino-esperantistino HILDA DRESEN (1896—1981). Ŝi postlasis riĉan poezian heredaĵon.

Kiel poetino Hilda Dresen havis multajn bulgarajn amikojn, kun kiuj ŝi subtenis viglajn kontaktojn. Multfoje ŝiaj verkoj aperis sur la paĝoj de niaj E-eldonaĵoj kaj ĝuis grandan popularecon.

La monda E-kulturo perdis talentan kreanton, kiu okupis lokon por ĉiam en la E-poezio.

# PERSPEKTIVA AGADFORMO



**La junulara E-movado en Bulgario havas riĉan historion kaj tradiciojn. La membroj de Bulgara E-Junularo nun daŭrigas tiujn tradiciojn, riĉigas ilin kaj serĉas novajn agadformojn.**

**Lastatempe kiel plej sukcesa agadformo elstaras la laboro de junaj e-istoj enkadre de la junularoj domoj. Jam pli ol unu jaron aktivas la E-sekcio ĉe Distrikta Junulara Domo en Ruse.**

**Al la prezidantino de la sekcio Binka Ŝiŝkova ni starigis kelkajn demandojn:**

**— Kio instigis la junajn e-istojn en Ruse fondi E-sekcion ĉe la Distrikta Junulara Domo?**

— La Distrikta Junulara Domo allogis nin per siaj riĉa materiala bazo kaj interesaj aktivecoj. Ni estis certaj, ke enkadre de ĝi ni povus okazigi pli varian agadon en natura junulara medio kaj pli sukcese propagandi la Internacian Lingvon inter la gejunuloj.

Nian agadon en la Domo ni komencis fine de 1979 per organizo de junulara E-kurso por komencantoj. Por tio helpis la tiama respondeculo pri la junularaj demandoj ĉe DE de BEA Stojĉo Cankov kaj la direktorino de la Domo Nevjana Malĉeva, kiu jam lernis E-on. Per komunikoj per la loka radioreto, anonco en ĵ. „Dunavska Pravda" kaj per persona varbado ni altiris 34 gejunulojn al la kurso. Granda parto de ili fariĝis membroj de la fondita en februaro pasintjare E-sekcio ĉe la Distrikta Junulara Domo.

**— Kiujn celojn kaj taskojn starigis antaŭ si la novefondita E-sekcio?**

— Unue, ni strebas unuigi la junajn e-istojn en la urbo kaj la proksimaj loĝlokoj el la distrikto. Ni jam sukcesis pri tio: nun la sekcio nombras 62 membrojn, precipe laboristojn kaj mezlernejanojn. Iuj el niaj membroj estas ankaŭ anoj de urbaj E-societoj, sed tio tute ne malhelpas ilin aktivi en nia sekcio. Eĉ io pli, per ili ni starigas ponton por proksima kunlaboro kun E-societoj „Libero", „Verda stelo" kaj „Ponto de amikeco".

Per nia agado por disvastigo kaj popularigo de E-o inter la junularo ni intencas plijunigi kaj freŝigi la konsiston de la urba E-movado. Tial rezulte de la sukcesa E-kurso en la Distrikta Junulara Domo 35 gejunuloj trapasis bone ekzamenon de unua grado. Estas ĝojiga la fakto, ke multaj el ili lernis plu E-on kaj ekdeziris viziti kurson por progresintoj.

Ekde la fondiĝo de nia sekcio ni klopodas starigi amikajn kontaktojn kun junaj e-istoj el la socialismaj landoj, precipe el la ĝemelaj urboj Riga, Bratislava, Torun, Potsdam, Szolnok. Ĝis nun ni sukcesis krei tiajn ligojn kun Riga, Szolnok (Hungario), Prago, Bukareŝto. Ni starigis viglajn perleterajn rilatojn al junaj sovetianoj el Krasnojarsk, Ufa, Kiŝinev, Kiev, Perm k.a. Po du niaj reprezentantoj partoprenis en Junulara E-Renkontiĝo en Tata (Hungario) kaj en Internacia E-Seminario en Phöben (GDR). Ni sendis sep niajn membrojn labori en junulara laborbrigado apud Potsdam (GDR), kie ili profundigis la amikajn rilatojn al junuloj el la ĝemela urbo.

**— Kiujn pli gravajn aktivecojn en la pasinta jaro vi mencius?**

— Ni havis interesajn kaj variajn kulturamasajn aranĝojn dum la pasinta jaro. En marto ni organizis printempan balon en la Distrikta Junulara Domo. La vespero estis gaja, kun muziko kaj dancoj, kun tombolo, kvizo, estis voĉlegitaj aforismoj en E-o.

La sekcio aktive partoprenis en la preparlaboroj de PARE'80, kiu pasis sub la signo de la 80-jariĝo depost la apero de organizita E-movado en Ruse. Ni inde plenumis la starigitajn taskojn koncerne la ornamon kaj la interkonan vesperon. Niaj membroj aktivis en diversaj eroj de la aranĝo.

Ni okazigis tuttagan laborbrigadon (plukado de fragoj) en v. Sandrovo (distrikto de Ruse) kaj perlaboris iom da mono por la sekcia agado. Kvankam la laboro estis malfacila kaj ne tre enspeza, la fina rezulto estis bona.

Omaĝe al la 1300-jara datreveno de Bulgario ni organizis marŝadon tra la bela Pirinmontaro. Gvidanto de la ekskurso estis V. Angelov — respondeculo pri la turisma agado de nia sekcio. Dum naŭ tagoj ni trairis interesan itineron. La celo estis montosupro Viĥren, kie ni metis memorplaton kun surskribo „Junulara E-Sekcio — Ruse". Tiel ni diskonigis nian agadon inter la turistoj. Krome dum la pasinta jaro ni aktive reprezentiĝis en la Junulara Renkontiĝo de Nordorienta Bulgario en Kubrat, en la Revuo de la E-Parolo kaj Kanto en Loveĉ kaj en la 40a Jubilea Kongreso de BEA en Plovdiv.

**— Kia estas via jarplano por 1981?**

— Dum 1981 ni strebos labori konforme al la decidoj de la 40a Jubilea Kongreso de nia Asocio. Ĉiumonate ni planas okazigi konversacian aranĝon — „parolanta rondo". Tiamaniere ni profundigos la parolkutimojn kaj altigos la lingvonivelon. Aŭtune ni organizos E-kursojn.

Ankaŭ ĉi-jare ni partoprenos aktive en PARE, en la Revuo de la E-Parolo kaj Kanto, organizos tuttagan laborbrigadon en la agrikulturo. Niaj membroj kunlaboros en la preparlaboroj de la Internacia Medicina E-Konferenco en Ruse.

**Evgeni GEORGIEV**




La juna esperantistaro de Meksikio sentas sin honorita pro la akcepto de la invito al TEJO, por ke la programeroj de la 37a Internacia Junulara Kongreso okazu unuafoje en tiu latinamerika lando.

Situanta je 1360 metroj super la marnivelo, Oaxtepec (prononcu Oastepek) estas apenaŭ 78 km for de la ĉefurbo Meksiko.

„Infano kaj Esperanto" — tiel tekstas la ĉeftemo de la IJK.

Oni ĝin proponas ĝuste por altiri la atenton de tiuj, kiuj interesiĝas iel antaŭzorgi la mondan estontecon. . .

# 66a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

## EL „OFICIALA KOMUNIKO" N-RO 2

Brazilio (Brazilo) — 25a de julio — 1a de aŭgusto 1981

**Honora Komitato**. Baldaŭ ni povos definitive anonci la konsiston de la Honora Komitato de la 66a UK, kiun nun eniras diversaj konataj figuroj de la publika kaj kultura vivo de la lando. Jam akceptis roli kiel Honoraj Prezidantoj de la Kongreso s-roj Said Farhat, ministro de socia komunikado (tre ŝlosila ofico en la brazila registara strukturo), kiu mem lernis la Lingvon Internacian, kaj Alcebiades Aimé Silveira Lamaison, guberniestro de la Federacia Distrikto.

**Dua Bulteno senpage por la Kongreso**. Malmultaj kongreslandoj tiel malavare subvencias la Universalan Kongreson kiel Brazilo. Ni jam anoncis la senpagan disponigon de la Kongrescentro de Brazilio fare de DETUR (Departamento de Turismo de la Federacia Distrikto). La presejo de la Senato komplezeme presis la 36-paĝan ilustritan Duan Bultenon kaj faros la samon pri la Kongresa Libro.

**Kolora bulteno pri la IJK**. Por la 37a Internacia Junulara Kongreso jam aperis, en pluraj variantoj, laŭ la kolorfotoj uzitaj, la unua informilo pri la 37a Internacia Junulara Kongreso en Oastepek (Oaxtepec), Meksikio. Ĝi enhavas informojn pri la kongresa temo „Infano kaj Esperanto", pri la kongresaj ejoj, la ĉirkaŭaj historie interesaj lokoj, la programo kaj la ekskurso.

**Unua ekstereŭropa infankongreseto?** LKK faris detalajn planojn por okazigi en Brazilio la 19an Internacian Infankongreseton. Ĉiuj 18 ĝisnunaj IIK okazis en Eŭropo.

**Poŝtmarko emisiota**. Jam estas definitive decidite, ke la brazila poŝto emisios almenaŭ unu poŝtmarkon por celebri la Universalan Kongreson.

**Preskaŭ mil kongresanoj**. Ĝis la unua semajno de februaro registriĝis 973 kongresanoj (inter kiuj 12 bulgaroj).

# LA RUĜA TRUMPETISTO

## (AL LA 75A NASKIĜTAGO DE ĤRISTO KOĈEV)

Li estis mezstatura, kun ronda kapo kaj retrokombitaj haroj, kun penetrema okulparo, senteme rigardanta la morton en la vizaĝon.

Mi ekkonis lin dum nia juneco en la apudegea urbo Ksanti. Li estis mia lernejkamarado el pli alta klaso. Por li, samkiel por liaj samklasanoj — Ivan Koĝamanov, Ivan Armin kaj Krâstju Belev, post jaroj famiĝinta kiel proleta verkisto, la junecaj frivolaĵoj ne estis kutimaj. Ni, el la pli malaltaj klasoj, rilatis al ili kiel al seriozaj aŭtoritataj pliaĝuloj.

Iunokte tamen la „nevenkeblaj" soldatoj de imperiestro Vilhelmo kaŝforlasis la urbon. Tuj post tio sekvis kapitulaco de la bulgara armeo, kaj la Egean Trakion okupis trupoj anglaj, francaj kaj italaj. Dum la aŭtuno de 1919 la okupantoj avertis ĉiujn bulgarajn familiojn fuĝi en Centran Bulgarion, ĉar Egea Trakio estas cedita al Greklando.

Pli ol cent mil familioj dissemiĝis tra la venkita ŝtato. La hejmanoj de Ĥristo Koĉev restis en Plovdiv. En la novaj loĝlokoj atendis la fuĝintojn nur mizero.

En la knaba gimnazio, kie Ĥr. Koĉev daŭrigis la lernadon, li studis samtempe tri fremdajn lingvojn — rusan, francan kaj Esperanton, oficiale instruatan de lektoro Penko Stoev. Tamen la mizera vivo de lia familio devigis lin forlasi la gimnazion kaj dungiĝi kiel tabaklaboristo.

En la Popoldomo li trovis novan lernejon. Tie li lernis muzikon kaj aliĝis kiel trumpetisto al la junkomunista kapelo. Li estis vere feliĉa vidi sin en uniformo de muzikisto — ruĝa ĉemizo kun emblemo, nigraj pantalonoj kaj verda kepo. La kapelo donis koncertojn, partoprenis manifestaciojn, solenaĵojn. Pro sia blovinstrumento Ĥristo ricevis la kromnomon „La ruĝa trumpetisto". Li daŭre studis Esperanton aŭtodidakte.

Kiam en aprilo 1925 la faŝista diktaturo masakris la gvidantojn de la laborista movado, Koĉev estis kooptita al la eksterleĝa distrikta komitato de Komsomolo. Sur tiu posteno li sukcesis organizi ĉelojn en diversaj entreprenoj. Samtempe li fariĝis kunlaboranto de la gazeto „Mladeĵka Iskra" (Junulara Fajrero).

La faŝista regantaro furiozis kiel pesto. La sekreta polico en Sofio sukcesis aresti la centran estraron de Komsomolo kaj pli ol 300 gejunulojn, inter ili Ĥristo Koĉev. Malgraŭ la inkviziciaj torturoj li neniun perfidis.

En la distrikta prizono li trovis dekon da veteranoj de la laborista movado, inter ili la filozofon Todor Pavlov, eminenta amiko de Esperanto. Dum sia restado en la prizono Ĥr. Koĉev ne metis flanken librojn kaj kajerojn.

Post kelkaj jaroj, pasigitaj en diversaj prizonoj, li revenis al siaj hejmanoj. Baldaŭ post tio la partianoj elektis lin sekretarion de la distrikta komitato. Kun obstino kaj persisto li sukcesis restarigi la organizaĵojn en la distrikto. Lia ĉefa merito dum tiu periodo estis la preparo de striko, kiun partoprenis miloj da tabaklaboristoj de Plovdiv kaj Asenovgrad. Kiel partigvidanto li helpis la fondon de laborista E-societo en la urbo.

En decembro 1930 Koĉev laŭ ordono de la Centra Komitato de BKP translokiĝis en Sofion. Li respondecis pri la gazetpropagando, internaciaj rilatoj kaj pri kontaktoj kun la distriktaj komitatoj. Li agadis sub la gvido de la energia sekretario de CK Nikola Kofarĝiev — Saŝo. Koĉev veturis tra la lando, instigis la kamaradojn prepari sin por la proksimaj balotoj. Li verkis artikolojn por la partia organo „Rabotniĉesko Delo".

En junio 1931 la Laborista Partio elektis por la parlamento tridekunu deputitojn. La reganta klaso estis ŝokita — tiom multe da komunistoj en la parlamento!

Policanoj kaj teroristoj embuskis por ĉasado de partiaj funkciuloj. Sango makulis la stratojn de Sofio. Nikola Kofarĝiev ne sukcesis eviti embuskon kontraŭ si. La vesperon de la 30a de oktobro li estis mortpafita sur str. „Debâr". Post du tagoj estis arestita Ĥristo Koĉev kune kun la administra sekretario de CK Caĉo Nenov.

Geŝev, la fifama ĉefo de la sekreta polico, esplorrigardis lin. Li proponis mildan punon, se la arestito denuncos siajn kunlaborantojn.

— Mi nenion diros! — deklaris decideme kaj kolere Koĉev. La inkviziciaj torturoj daŭris tri tagnoktojn. Je la kvara tago oni trovis Ĥristo'n morta en la ĉelo.

La socia tempesto, al kio, strebis la ruĝa trumpetisto venis dektri jarojn post lia morto kaj forbalais la murdistojn kaj iliajn mastrojn sur la rubejon de la historio. Tamen la nomo de Ĥristo Koĉev brilos eterne en la analoj de BKP kaj restos ekzemplo en la memoro de la estontaj generacioj.

Ĥ. M. G.

BULGARIO 1300

# PLISKA KAJ PRESLAV

## (ANTIKVAJ ĈEFURBOJ)

Ĥristo STOJANOV

La fluo de turistoj ne ĉesas al Pliska kaj Preslav — la antikvaj ĉefurboj de la bulgara ŝtato. Ĉiam pli alvenas ĉi tien ankaŭ eksterlandaj turistoj, gastantaj en Bulgario okaze de ĝia 1300-jara datreveno.

La unua ĉefurbo de la bulgara ŝtato Pliska troviĝas je 23-kilometra distanco de la distrikta centro Ŝumen (Norda Bulgario) kaj je 2 km de la nuna vilaĝo Pliska. Al ĝi kondukas asfaltita okkilometra ŝoseo, kiu flankiĝas de la aŭtovojo Sofio—Veliko Târnovo—Varno.

Pliska kuŝas sur roka ebenaĵo, ĉirkaŭita de montetoj, kiuj iam estis kovritaj de densaj arbaroj. Laŭ la prifositaj kaj restaŭritaj fundamentoj de konstruaĵoj ĝin zonis tri samcentraj linioj da fortikaĵoj. La ekstera urbo, nomata same Pliska, estis ĉirkaŭita per foskavoj kaj remparo. Ĝia areo ampleksis 23 km² — por urbo de VII jc. tio estas imponaj dimensioj. La interna urbo havis formon de trapezo, en kies anguloj staris gardoturoj; ĉiulatere de la trapezo estis urbaj pordegoj. En la interna urbo troviĝis la plej monumentaj konstruaĵoj: la trona palaco, konstruita el kalkoŝtonaj blokoj, la malgranda palaco (inkluzivanta la reĝloĝejon, kultajn konstruaĵojn, akvorezervujon, banejojn, mastrumajn konstruaĵojn ktp.). Oriente de la interna fortikaĵo estis pavimita vojo, kiu kondukis al la ĉepalaca preĝejo, ankaŭ kun imponaj dimensioj — 2920 m². En la ekstera kaj interna urboj estas trovitaj ankaŭ fundamentoj de kelkaj kristanaj preĝejoj el la epoko de la frua kaj pli malfrua feŭdismo.

La ruinoj de Pliska, konsternantaj per sia grandiozeco, atestas la konstrutalenton de la bulgaroj. Ili impresas antaŭ ĉio per la kulturo kaj talento de la bulgaraj reĝoj en la tempo de la frua Mezepoko, kiel ankaŭ per la kulturo kaj talento de la konstruintoj kaj administrantoj, de la militistoj kaj reformantoj.

Pliska estis incendiita en 811 de la bizanca imperiestro Nikifor, kiu poste pagis pro tio per sia propra kapo.

En tiu sama nordbulgara regiono troviĝas ankaŭ la dua ĉefurbo de la Unua Bulgara Regno (893—972) — Veliki Preslav, deklarita kiel arkeologia rezervejo. Norde de ĝi, en pitoreska regiono, situas banloko Preslav, kiu, per asfaltita ŝoseo, estas en interkomunika ligo kun la centra aŭtovojo.



Pliska

Difereucc de Pliska, kiu estis konstruita sur ebenaĵo,



Preslav

Veliki Preslav situas en arbara loko. Tio fakte determinis la aranĝon de ĝiaj fortikaĵoj, etendiĝantaj laŭlonge de montodeklivoj kaj sekvantaj ties kurbiĝojn. La ekstera linio de la fortikaĵo prezentas potencan ŝtonmuregon, zonantan teritorion de 3,5 km². La muregoj kaj la pordego de la fortikaĵo nur parte konserviĝis.

Apartan admiron al Veliki Preslav elvokas la arkitekturo de la Palaco kaj la Ora (Ronda) Preĝejo (907) kun 12 rondaj niĉoj kaj 12 kolonoj el blanka marmoro. Veliki Preslav postlasis profundajn spurojn en la mezepoka historio de Bulgario kiel kultura kaj politika centro kaj ankaŭ kiel grava metiista centro sur la Balkanoj. Multnombraj trovaĵoj atestas la mirindan majstrecon de la juvelistoj, potistoj, ŝtonĉizistoj, ceramikistoj, klare demonstrante la altajn materialan kaj spiritan kulturojn de ĉefurbo de regno en X jc., kiam Bulgario travivis sian „oran epokon".

Neordinaran intereson prezentas la tutmonde konata ceramika ikono de sanktulo Teodoro — ĉefverko de la Preslava Pentroarta Skolo dum la regado de Simeono la Granda.

## FAKTOJ, KONDUKANTAJ AL MEDITOJ. . .

Per siaj organizaj principoj la bulgara ŝtato, jam en la unua momento de sia fondiĝo, distingiĝis de alitribaj landoj kaj popoloj per memvola unuiĝo de prabulgaroj kaj slavoj. Antikvaj analistoj ne senbaze nomis ĝin „Bulgara unuiĝo".

*

Arkeologiaj prifosoj evidentigas, ke la landlima remparo, kies konstruon ĥano Asparuĥ entreprenis dum la kreo de la bulgara ŝtato (681), estis centojn da kilometroj longa (nur sur la teritorio de nuntempa Rumanio 300 km); ĝia ĉebaza larĝo — 10 ĝis 25 m, kaj la alto — 3 ĝis 8 m.

*

Komence de IX jc. unu el la unuaj regantoj de Bulgario ĥano Krum promulgis dekreton pri punoj pro kalumnio, ŝtelado kaj ebrieco. Tiu sama ĥano estis ankaŭ unu el la unuaj suverenoj laŭleĝe konfirminta (se paroli laŭ la nuntempaj konceptoj) specialan garantion por malriĉuloj, pri ties rajto je laboro kaj pri konforma pago.

*

Ĉe ĥano Omurtag (814—831) la bulgaroj fariĝis konstruema popolo. Tiutempe komenciĝis amasa konstruado de urboj kaj vilaĝoj, de palacoj, domoj, monumentoj, akvoduktoj, fortikaĵoj. Por konstrui nur la muregojn de urbo Veliki Preslav oni uzis 350 000 kubajn metrojn da ŝtonblokoj.

*

Freskoj de la Bojana preĝejo, konstruita en 1259 en la regiono de Sofio, estis faritaj antaŭ la renesanca epoko en la eŭropa pentroarto. Ili atestas, ke jam en tiu tempo la bulgaraj pentristoj posedis eksterordinaran talenton, erudicion, progreseman menson. Iliaj verkoj estis en intima ligo kun la reala vivo de l'popolo.



**Fortikaĵo Carevec — Veliko Târnovo**



# BAJKUŜEVA PINO

En la legenda Pirin-montaro estas multaj naturaj belaĵoj kaj fenomenoj. Unu el ili estas la Bajkuŝeva Pino. Ĝi levas sian korpulentan staturon proksime al montodomo „Bânderica", en la piedoj de supro Viĥren. Tute eta aspektas la homo kompare kun tiu giganto, vivinta 1200 jarojn! Tiu ekzemplero de nigra pino*) estas tute konservita, eksterordinara natura monumento, etendinta vaste siajn branĉojn. Ĝia rompita pinto estas alta pli ol 20 metrojn, kaj la trunkon povus ĉirkaŭbraki 5—6 homoj. La Bajkuŝeva Pino estas muta atestanto de la ĝisnuna historio de la bulgara ŝtato. Ĝi salutis la kreon de la slava skribo de Kiril kaj Metodi, travivis la grekan kaj turkan jugojn, estis atestanto de ribeloj kaj partizanaj bataloj, inspiris la poetojn Vazov, Javorov, Vapcarov. . Ties serpentsimilaj radikoj, kiuj nestas firme, rezistas obstine kontraŭ ĉiuj tempestoj, lavangoj kaj aliaj naturaj plagoj dum jarcentoj.

Al multaj homoj ŝajnas nekredebla la longa vivo de la pino. Sed ĝi estas plene pruvita fare de la inĝ. arbaresploristo Konstantin Bajkuŝev kaj merite portas lian nomon. Li malkovris tiun arbon dum ekskurso tra Makedonio kaj Olimpo-monto en 1897.

Kiel specio la nigran pinon malkovris la botanikisto Ĥrist en 1851 sur Olimpo. En la Balkana Duoninsulo ĝi kreskas en Tesalio, Makedonio, Hercegovino, Montenegro, Albanio. Estas trovebla ankaŭ en Suda Italio (Kalabrio).

Ĉe ni ĝi kreskas sur Pirin-monto, en ties nordorienta parto, kaj sur Slavjanka-monto— de 1600 ĝis 2100 m super la marnivelo. Unu el la plej grandaj kaj naturaj trovejoj estas en Pirin, en la lokoj Ĝinĝirica kaj Suĥi Dol — Bela Reka — Bejovi Dupki apud urbo Razlog, kie ĝi formis tutecan komplekson. •

*) Nigra pino (pinus leocodermis).

Pârvan BAJKUŜEV

# FELIĈAN FESTON, MEDICINISTOJ-ESPERANTISTOJ!

La celebro de la 7a de aprilo kiel Tago de la Medicinaj Laboristoj en nia lando estiĝis bonega tradicio, simbolo de alta prijuĝo de BKP kaj la popolo pri ilia abnegacia laboro, pri la grandaj sukcesoj, atingitaj en la sfero de sanprotekto kaj en la medicina scienco.

Al tiuj sukcesoj, kiuj firmigis la aŭtoritaton de la bulgara medicina scienco en la tuta mondo, kontribuis konsiderinde ankaŭ la medicinistoj-esperantistoj, kies nombro plimultiĝas. La Medicina E-Sekcio kaj la medicinaj E-societoj en diversaj distriktoj de la lando vigle agas ne nur rilate la sankleriĝon kaj sanprotekton de la loĝantaro, sed ankaŭ por la disvastigo de la Internacia Lingvo en nia lando. La medicinistoj-esperantistoj strebas per ĉiuj fortoj kaj konoj plenumi sian noblan taskon kaj esti ekzemplo de sindonaj laboristoj kaj indaj membroj de nia socialisma socio.

Ĉi-jare la bulgaraj medicinistoj-esperantistoj estos gastigantoj de la III Internacia Medicina E-Konferenco, kiu okazos en Ruse de la 15 ĝis 19 de julio laŭ la programo de UMEA kaj kun la aktiva helpo de Bulgara Esperantista Asocio. Tiun konferencon oni organizas ankaŭ honore al la 1300-jariĝo de Bulgario. La rezultojn de la konferenco oni raportos en la kunveno de UMEA dum la Universala Kongreso en Brazilio.

En la nomo de la CE de BEA, de la Estraro de Bulgara Medicina E-Sekcio, de la redakcio de „BE" kaj de ties legantaro — tutkorajn gratulojn al ĉiuj bulgaraj medicinaj laboristoj okaze de ilia festotago — la 7a de aprilo, kaj bondezirojn pri sano, feliĉo kaj multaj novaj sukcesoj en la socia sanprotekto.

**Prof. d-ro Kiril POPOV,**
Prezidanto de la Medicina E-Sekcio de BEA

---

Fine de majo k. j. en Karl-Marx-Stadt okazos III Konferenco de e-istoj en la Kulturligo de GDR.
Bonvolu sendi salutleterojn kaj bildkartojn al Kulturligo de GDR. Distrikta Laborrondo Esperanto, DDR-90 Karl-Marx-Stadt, Dr. Otto Nuschke-Str. 6, GDR. Anticipan dankon!



## LA ERARO DE AKADEMIANO DINEKOV

Kiam oni frontas asertojn, ke la esperantistoj celas anstataŭon de la naciaj lingvoj per Esperanto, oni prave konkludas, ke temas pri asertantoj, kiuj ĉerpas sian informon el onidiroj. Oni ne povas tamen ne esti surprizita, kiam similaj asertoj eliras el sciencaj laboristoj, do homoj, por kiuj la onidiroj ne povas esti fonto de informoj, tiom pli, kiam ties fako estas proksima al la problemoj de la lingvo.

Jen pro kio ne povis ne surprizi la asertoj de akademiano Dinekov, literaturisto, en la ĵurnalo „Otečestven front" (la 13an de februaro ĉi-jare), ke „. . . la esperantistoj. . .opiniis, ke la evoluiĝo de la naciaj lingvoj estas preskaŭ superflua, ĉar finfine la homaro venos ĝis unu internacia lingvo — Esperanto . . .", kaj ke „tio estas utopio, nature, sed la interna ideo de la esperantistoj estas ĝuste tiu".

La senfundeco de la asertoj de akademiano Dinekov estas tiom evidenta, ke oni sentas sin embarasita alpaŝi al ĝia refuto. La esperantistoj ne nur ne celas anstataŭon de la naciaj lingvo per Esperanto, sed, kontraŭe, celas firmigon de la naciaj lingvoj. La ekzisto mem de Esperanto kondiĉigas la ekziston de la naciaj lingvoj. Esperanto estas ponto, kaj pri ponto oni povas paroli nur tiam, kiam ekzistas bordoj. Se ne ekzistas bordoj, t. e. naciaj lingvoj, ne estas necesa la ponto. Do, la „interna ideo" de la esperantistoj estas tute kontraŭa al tiu, kiun malkovras akademiano Dinekov. Eble li havas antaŭvide tiun klarigeblan por ĉiu nova socia fenomeno naivecon de la unuaj adeptoj, kiu delonge jam estas nur epizodo en la historio de la esperantista movado.

La asertoj de akademiano Dinekov estas tre simptomaj. Ili atestas pri tio, kia estas la grado de seninformiteco en la rondo de niaj sciencistoj pri la esenco kaj destino de la Internacia Lingvo kaj pri la celoj de la esperantistoj. Kaj tio devas serioze pensigi nian propagandon.

**Ljubomir MIĤAJLOV**

---

**Korekto:**

En n-ro 2/81, sur paĝo 10, unua kolumno, linioj tria kaj dua de malsupre, legu: „la tablo estas grande".

DEDIĈE AL INTERNACIA JARO DE LA HANDIKAPITOJ

# LUCKY

1981 estas proklamita de UN kiel Internacia Jaro de la Handikapitoj*). Ili estas pli ol 450 milionoj, el kiuj 140 milionoj estas infanoj, 40 milionoj — blinduloj. En la evoluantaj landoj vivas 80% de ĉiuj invalidoj, sed ili ricevas nur 10% de la helpo, destinita por la tuta nombro.

La invalideco havas diversan aspekton kaj originon. Unu el la plej teruraj handikapoj, kaŭzitaj al la homo de naturplagoj aŭ de la homo mem (militoj k.a.), estas la blindeco. La nombro de la blinduloj en la mondo daŭre kreskas. Laŭ informo de la Monda Organizo pri Sano, nuntempe estas pli ol 40 milionoj da blinduloj kontraŭ 16 milionoj en 1950. En la socialismaj landoj oni multe kaj efike zorgas pri la blinduloj. Tio povus esti temo de speciala artikolo.

Nun mi deziras koncize rakonti pri alia formo de helpo al la blinduloj, aplikata en Anglio, nome per disponigo de gvidhundoj.

Unuan fojon mi vidis tian hundon en 1979, en Barlaston, Anglio, kie mi partoprenis en Intensaj E-Kursoj kiel gastpreleganto laŭ invito de d-rino Marjorie Boulton el Oxford.

Kiam ni eniris la ĉarman vilaon, en kiu dum la tuta jaro estas efektivigataj diversaj kvalifikaj kursoj, en la akceptejo estis jam kolektiĝintaj pli ol 30 diversaĝaj homoj. La d-rino estis renkontita per aplaŭdoj, ĉar la plimulto el ili estis venintaj por dua aŭ tria fojo.

Mian atenton altiris grupo da blindaj junaj homoj: virino kaj viro, evidente geedzoj, kaj junulo, en kies piedoj kuŝis flava trovhundo, kiu atente kaj esploreme observis la enirantojn per siaj grandaj brunaj okuloj. Mi proksimiĝis kaj prezentis min al la junulo, petante permeson karesi la hundon. Li ĝentile ekridetis kaj same prezentis sin: Dennis Friedman (Fridman).

„Kaj tio estas Lucky (Lâki)**), mia gvidhundo" — aldonis li, frapetante amike la kapon de la hundo. Mi eksciis, ke Dennis estas instruisto pri muziko en iu kolegio de Manĉester. Lia edzino (vidulino) instruas en la sama kolegio germanan lingvon. Ili havas tri infanojn.

Dennis rakontis al mi, ke Lâki akompanas lin al la kolegio, al aŭditorio, kancelario, manĝejo, al la hejmo, al la stacidomo kaj en diversaj urboj — kiel nun en Barlaston. Kun ŝi li butikumas, vizitas amikojn.

Lâki ĉiam silentis. Tiuj gvidhundoj estas edukitaj subpremi siajn instinktojn kaj esti rigore disciplinitaj. Ili devas silenti, ĉar ili akompanas la blindulojn al koncerto, preĝejo, restoracio kaj aliaj publikaj lokoj. Nur dufoje mi aŭdis ŝian voĉon.

Dennis avertis nin ĉiujn ne doni nutraĵon al Lâki, ĉar tiurilate ŝi obeas disciplinon.

El ĉio, kion Dennis rakontis al mi pri Lâki kaj kion mi legis en ĵurnaloj, mi eksciis jenon pri la gvidhundoj.

La jaro 1981, proklamita kiel Internacia Jaro de la Handikapitoj, estas jubilea ankaŭ por la movado pri gvidhundoj en Anglio. Pleniĝas 50 jaroj, depost kiam en tiu lando estis kompletigita la unua grupo de trejnistoj kaj edukotaj gvidhundoj (1931). Oni diras: „Brajl faris la blindulon klera, sed la gvidhundo faris lin moviĝema".

La organizaĵo, kiu okupiĝas pri problemoj de gvidhundoj kaj blinduloj, estas absolute bonfara. Ĝi havas propran centron por bredado de hundoj kaj ses centrojn por ilia trejnado. Centoj da volontulaj familioj okupiĝas pri „promenigo" de la hundidoj kaj instruas ilin adapti sin al la jungilaro, moviĝi sur trotuaro, halti ĉe rando kiam neceses, transiri stratojn kun vigla trafiko.

Nur kiam la trejnistoj en la speciala centro estas absolute certaj pri la bona kvalifiko de la gvidhundoj, oni trejnas ilin ankoraŭ dum kvar semajnoj kune kun la blinda kandidato.



Rajna Konstantinova (dua de maldekstre) inter siaj anglaj geamikoj kaj la gvidhundo Lucky

*) Handikapitoj (invalidoj)
**) Lucky (esperante: „Feliĉulino")

Kompare al la elspezoj, kiujn la centroj por gvidhundoj pagas, la taksoj por la hundo kaj kuna trejnado estas minimumaj.

Nun en Anglio ekzistas 2700 posedantoj de gvidhundoj. La jara postulo por gvidhundoj estas pli ol 500. La meza laborkapablo de la hundo estas 8 jarojn (escepte ankaŭ 10 aŭ eĉ 12 jarojn), post kio la blindulo havas prioritaton por ricevo de nova gvidhundo.

Plej preferata raso estas la flavaj trovhundoj (70%), ankaŭ germana ŝafhundo kaj hibridoj.

La helpo, kiun la socio donas al la blinduloj pere de tiu bonfara organizaĵo, estas nobla kaj laŭdinda. Dank' al la gvidhundo, la blindulo povas apliki profesion aŭ ĝui hobion.

Li sentas sin egalvalora al la viduloj, havante siajn „vidantajn okulojn" apud siaj piedoj. . . Tia ja estas ankaŭ la gvidhundo Lâki.

Rajna KONSTANTINOVA

KINO

## «MI NE VIVAS UNU VIVON»

Sur la ekranoj aperis la nova longmetra artdokumenta filmo „Mi ne vivas unu vivon", dediĉita al la vivo kaj kreado de la eminenta bulgara opera kantisto Nikolaj Gjaurov. Reĝisoro — Nikola Korabov, filmisto — Viktor Ĉiĉov. La aŭtoroj de la filmo akompanis la kantartiston en lia turneo tra operaj mondscenejoj kaj filmis lin en liaj plej konataj roloj: Boris Godunov, Mefistofel, Don Bazilio, reĝo Filipo, Don Kiĥoto. Kune kun tio Gjaurov rakontas pri sia vivo, pri siaj unuaj paŝoj sur la opera scenejo, pri siaj renkontoj kaj laboro kun elstaraj muzikistoj el la tuta mondo.

„La du jaroj, dum kiuj ni filmis, por ĉiam restos en mia memoro. — diris la reĝisoro Nikola Korabov. — Mi amikiĝis kun Gjaurov. Kantante, li sentas ĝojon — ĝojon en la krea procedo, strebas al perfekteco kaj pureco de la formo. Kia estas Gjaurov, kia estas lia ĉiutaga vivo? Respondon al tiu demando donas lia taglibro, en kiu la tagoj por la sekvantaj kvin jaroj estas planitaj laŭhore — spektakloj, gastvizitoj, surbendigoj. . ."

Multaj eksterlandaj televidoj jam aĉetis la filmon.

## ZAMENHOF PRI LITERATURO, TEATRO, GAZETO

La konstanta kreskado de nia literaturo (kun ĝi ankaŭ la kreskanta elasteco de la lingvo) iom post iom silentigos niajn nudvortajn malamikojn kaj malaperigos ĉian dubon pri la vivpoveco de nia lingvo, tiam volenevole, post 1 aŭ post 10 aŭ post 25 jaroj la registaroj devos aliĝi al ni, kaj tiam „lingvo tutmonda" fariĝos fakto plenumita. . .Agadi per lernolibroj, anoncoj k. t. p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon apud la literaturo. (Originala Varkaro, p. 206).

* * *

Sed la plej efika maniero de propagando estus, se oni povus aranĝi migrantan teatran trupon esperantan (mi pensas, ke en Parizo estus tre facile trovi impresarion, kiu aranĝus tiun trupon). Tia trupo, migrante tra ĉiuj plej gravaj urboj de Eŭropo kaj Ameriko kaj donante ĉie teatran prezentadon de iaj dramoj en Esperanto aŭ almenaŭ dialogojn kaj kantojn en tiu ĉi lingvo, farus ĉie grandan bruon kaj alportus al nia afero riĉegajn fruktojn, ĉar nenia teoria parolado pri Esperanto povas tiel bonege efiki, kiel ludado de dramoj aŭ almenaŭ kantado en Esperanto. (Letero de L. L. Zamenhof, 1, p. 47).

* * *

Nia nuna gazeto ne aperas kiel io nova, partia, kiel kelkaj en la komenco pensis; ĝi estas — kvankam sub alia redakcio — pura daŭrigo de la gazeto antaŭa; ĝi prezentas nian komunan tre bone redaktitan centran organon kaj mi varmege rekomendas ĝin kiel unuan kaj plej necesan objekton por niaj amikoj. Ĉion alian niaj amikoj povas fari aŭ ne fari; sed kiu ne abonas nian standardon, la gazeton „Lingvo Internacia", tiu ne estas esperantisto (Originala verkaro, p. 215).

## ANONCOJ

EN JUNIO okazos la celebro de la 775-jariĝo depost la fondiĝo de urbo Dresden (GDR). Bonvolu sendi salutojn al la E-grupo ĝis la fino de majo. Respondo garantiita. Adreso: Kulturbund der DDR, KAG Esperanto, DDR-8016 Dresden, PSF 44, GDR.

•

La MILANA ESPERANTO-KLUBO festas ĉi-jare sian 75-jaran jubileon. Niaj italaj amikoj petas sendadon de salutleteroj kaj bildkartoj. Adreso: Milana E-Klubo, piazza Sempione 1, I—20145 Milano, Italio.

•

Okaze de la 75a datreveno depost sia fondiĝo Grupo Esperantista de Bilbao organizas INTERNACIAN RENKONTIĜON la 18—21 de junio k.j.

La programo inkluzivas interkonan vesperon, celebron de niaj veteranoj, diskutrondon pri la nuna situacio de E-o, ekskurson al Guernica, projekcion de E-filmo k.a.

Pliajn informojn donas: Grupo Esperantista de Bilbao, Barrencalle Barrena, 7. I. ° dcha, Bilbao —5, Hispanio.

## PREMIO «H. K. ANDERSEN» — AL VESA PASPALEEVA

Ĉiujare eminentaj verkistoj el diversaj landoj estas premiataj per la internacia literatura premio „Hans Kristian Andersen" pro ilia verkaro kaj amo al infanoj kaj pro la amo de infanoj al iliaj porinfanaj verkoj.

Per tiu mondfama literatura premio estis distingita en 1980 la bulgara poetino VESA PASPALEEVA pro sia libro „Printempo en patrolando" kaj pro sia tuta porinfana verkaro.

Dum 60 jaroj Vesa Paspaleeva verkis kun profunda amo al la infanoj kaj herede postlasis al ni grandan literaturan riĉaĵon — poemarojn pri infanoj, kies versojn konas bone junaj kaj maljunaj legantoj ne nur en nia lando, sed ankaŭ eksterlande. Ŝiaj pli ol 50 libroj enhavas versaĵojn, rakontojn, fabelojn, teatraĵetojn, kiuj posedas altan moralecon kaj instruas al laboro, kuraĝo, al bonaj kutimoj, al amo patrolanda, al amikeco kaj amo al infanoj el la tuta mondo.

Vesa Paspaleeva forpasis la pasintan jaron (80-jaraĝa), sed per sia verkaro ŝi restas kiel pli granda amikino de la infanoj — proksima al iliaj sentoj, pensoj, ludoj kaj ridoj.

Ĉi-sube ni publikigas la ege konatan versaĵon „Kontenta", laŭ kiu estat verkita unu el la plej ŝatataj infanaj kantoj — kune kun la notoj. Eble iuj el vi rememoros kaj denove ekkantos ĝin?

## ANEKDOTOJ

— Kiu rompis vian fenestron?
— Panjo. Sed kulpa estas paĉjo.
— Kial do?
— Ĉar li saltis flanken.

* * *

— Paĉjo, ĉu vi povas skribi vian nomon kun fermitaj okuloj?
— Certe!
— Bone. Fermu la okulojn kaj subskribu mian poentolibreton. . .

* * *

— Nepino, ĉu la dolĉaĵo bongustis?
— Mi tre rapide formanĝis ĝin kaj ne komprenis. Donu al mi ankoraŭ iom kaj mi diros al vi. . .



K O N T E N T A

Gaje — Muziko de BORIS KOĈEV



### KONTENTA

Ekde nun mi havas
novajn pantalonojn,
en poŝeto saltas
semoj kaj bonbonoj.
Robojn * sub tegmenton
mi elĵetos ĉiujn,
ke neniam panjo
faru min knabino.
Por mi tiam estos
honte kaj malbone.
Kie min mi kaŝos,
kiam mokos oni?
Pigro kaj katino
ĉe la anguleto
miras: kiom kreskis
dum ĉi nokt' knabeto!
En la kort' prestiĝon
grandan jam mi havas.
Tiu pantalono
kiom multe gravas!

Esperantigis: Ljudmila PASPALEEVA


* Iam tre malgrandajn knabetojn oni vestis en robojn.

815 W

# DISTRA PAĜO


## MOZAIKO

Tra kiuj dek partoj de la mozaiko vi devas trairi, por ke vi atingu la sumon 100? Startu ekde la plej supra maldekstra parto (n-ro 10) kaj malsupreniru ĝis la plej dekstra parto (sumo 100).





## ĈU VI RAPIDE ORIENTIĜAS?

Kiu ŝlosilo por kiu serurtruo konvenas? La ŝlosiloj estas signitaj per ciferoj kaj la serurtruoj per literoj. Limtempo kontrola por solvo kvar minutojn.




## ĈU VI ESTAS OBSERVEMA?

Sur la du bildoj estas kelkaj diferencoj. Provu ilin malkovri!



## КАЛЕНДАРЕН ПЛАН НА ЕСПЕРАНТСКИТЕ МЕРОПРИЯТИЯ ЗА 1981 г.

| ТЕМА | ГРАД | ДАТА |
|---|---|---|
| 1. ВАРЕ | Кубрат | 7—8 февруари |
| 2. Преглед на есперантското слово и песен | Пазарджик | 3—5 април |
| 3. ПАРЕ | Русе | 11—12 април |
| 4. Люлякова вечер | Ловеч | 25—26 април |
| 5. Панаирна международна среща | Пловдив | 9—10 май |
| 6. Гребен поход по Марица | Пловдив | 9—10 май |
| 7. Регионална среща | Троян | 9—10 май |
| 8. Възпоменателно събрание за Иван Крестанов | Средногорие | 16 май |
| 9. Международен есперантски туристически семинар „През гори и планини" | Велинград | 17—27 май |
| 10. Симпозиум „1300 години България" | Шумен | 29—31 май |
| 11. Рецитал и ораторски конкурс за Хр. Ботев | Враца | 31 май—2 юни |
| 12. Празник на розата | Карлово | 5—6 юни |
| 13. Среща на есперантисти от Югозападна България | Самоков | 13—14 юни |
| 14. МАРЕ | Варна | 20—21 юни |
| 15. Национална конференция по екологизация на на общ. производство | Свищов | 15—20 юни |
| 16. Летен лагер | с. Борима, Ловешко | 1—10 юли |
| 17. Международна среща на медицинските работници | Русе | 15—19 юли |
| 18. Международен шах — турнир | Варна | 16—29 юли |
| 19. Международна есперантска младежка бригада | с. Добродан и с. Дебнево, Ловешко | 12 юли—6 август |
| 20. Регионална среща за обмяна на опит | Казанлък | 5—6 септември |
| 21. Международен есперантски семинар | Велинград | 19—29 септември |
| 22. Семинар за обучение на младежи-активисти | Велинград | 26—27 септември |
| 23. Златна есен | с. Борима, Ловешко | 4—11 октомври |
| 24. Кестенова вечер | Петрич | 17—18 октомври |

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL